

*Vidigas ĝi, ternante, planon
Ĉagreni vin intence!*

Ĥoro.

(en kiu partoprenis la kuiristino kaj la bebo mem)

Ŭaŭ, Ŭaŭ, Ŭaŭ!

Dum la Dukino kantis la duan version ŝi forte kaj daŭre ĵetadis la infanon supren kaj rekaptis ĝin, kaj la kompatinduleto tiel forte kriegis ke Alicio apenaŭ povis aŭdi la vortojn:—

*Mi devas la infanon skui
Kaj bati kiam ternas;
Ĉar li la pipron povas ĝui,
Jam longe li ĝin lernas.*

Ĥoro.

Ŭaŭ, Ŭaŭ, Ŭaŭ!

“Jen! Se al vi plaĉas, vi povas varti ĝin!” diris la Dukino al Alicio kvazaŭ ĵetante la infanon al ŝi. “Mi devas pretigi min por la krocketludo ĉe la Damo” kaj ŝi eliris rapide la ĉambron. La kuiristino en la ĝusta elira momento ĵetis kontraŭ ŝi grandan kaserolon, sed ĝi maltrafis.

La infano estis strangforma kreaĵeto, kiu etendis la brakojn kaj krurojn en ĉiu direkto (kiel marstelo, pensis Alicio). Do apenaŭ al ŝi prosperis kapti ĝin. Tuj post la kapto ŝi rimarkis ke ĝi *puf-puf*—as kiel lokomotivo kaj alterne duobligas kaj rektigas sin. Sekve dum la unuaj minutoj Alicio apenaŭ povis teni ĝin.

Baldaŭ tamen ŝi eltrovis ke la unu nura metodo taŭge varti ĝin estas tordi la korpon en bantformon, kaj premteni dekstran orelon kaj maldekstran piedon, por ke ĝi ne malligu sin.

Tion farinte ŝi forportis ĝin for de la domo. “Se mi ne forportos ĉi tiun infanon, oni certe mortigos ĝin post nemultaj tagoj. Do, se mi ne forprenus ĝin, mi estus mem kulpa je la mortigo.”

La lastajn vortojn Alicio diris laŭte, kaj la etaĵo (ĝi jam de longe ĉesis terni) responde—porkblekis! “Ci ne devas grunti” diris Alicio; “tio ja estas tute maltaŭga rimedo por esprimi la sentojn!”

Sed denove la infano gruntis. Sekve Alicio tre serioze observis la vizaĝon, por vidi kio estas al ĝi. Sendube ĝi havis tre porkan nazon, kiu pli similis al porka nazego ol al hombeba nazeto; ankaŭ la okuloj fariĝis tre malgrandaj, kaj entute Alicio ne ŝatis la nunan ŝajnon.

“Eble ĝi nur plorkrietis” ŝi pensis kaj denove rigardis en la okulojn por vidi ĉu enestas larmoj.

Larmoj ne enestis.

“Se vi intencas fariĝi porketo” diris ŝi serioze “mi tuj ĉesos prizorgi vin; vi atentu tion!” La porkinfano denove plorkriis aŭ plorblekis (neeble estas paroli precize) kaj dum kelka tempo ili iris silente.

Alicio ĵus komencis pensi en si “Do, kion

